

## La katalunaj esperantistoj Socilingvistika trarigardo

### Resumo

Surbaze de enketo inter 98 katalunaj esperantistoj, la esploro, unuflanke, komparas la ecojn de tiu kolektivo kun tiuj de la kataluna socio kaj, aliflanke, analizas la grupon mem kaj la eventualan evoluon de la membroj. La esploro ne subkomprenas, kiel antaŭaj enketoj en aliaj landoj, la membrecon en landa asocio kiel sinonimon de esperantisteco, sed aparte interesiĝas pri la difino de la koncepto “esperantisto” kontrastigante diversajn respondojn. Aliflanke, ĝi provas certigi ekvilibrigitan samplon por eviti deviojn en la rezultoj pro superreprezentigo de difinitaj subgrupoj. La rezultoj montras plurajn atentindajn deviojn de la katalunaj esperantistoj disde siaj samlandanoj – aparte pri klereco, politikaj sintenoj kaj okupado de la libera tempo –, kaj samtempe konfirmas la rezultojn atingitajn en aliaj landoj, malgraŭ kelkaj rimarkindaj diferencoj eventuale klarigeblaj pro la nacia kaj lingva minoritateco de la katalunaj esperantistoj.

### 1 Enkonduko

Dekon da jaroj post la eldono de la unua gramatiko de Esperanto aperis signoj pri la unuaj katalunoj, kiuj interesiĝis pri ĝi. Ĉi tiuj pioniroj, laŭ la analizoj de la historiistoj, estis pastroj, militistoj kaj liberalaj profesiuloj. Tio povas nun surprizi, sed klariĝas, se pensi, kiuj tiutempe sciis legi kaj skribi kaj krome disponis pri sufiĉe da tempo por okupiĝi pri nepagata aktivado. Ĉar la socio multe ŝanĝiĝis, tia priskribo ne kongruas kun la prototipo de hodiaŭa esperantisto, kiun ni vole-nevole havas enkaŭ.

Kvankam en aliaj landoj estis faritaj sociologiaj esploroj pri la lokaj esperantistoj, tiaj ankoraŭ mankis en Katalunio, krom kelkaj studentaj monografioj<sup>1</sup>. Sekve, la celo de nia studo estis trovi la socian, kulturalan kaj ideologian profilon de la kataluniaj esperantistoj. Nia komenca impresio estis, ke temas plimulte pri viroj, el meza aŭ suba-meza klaso, kun alta klereco, poliglota, kun kulturaj intereso, politike proksimaj al la kataluna sendependismo kaj, malpli, al anarkiismo. La studo celis konfirmi tiun impreson, komparante diversajn trajtojn de la esperantistoj kun la tuta loĝantaro. Samtempe ni esploris, ĉu estas sociaj aŭ ideologiaj paradigmoj korelaciigitaj kun pli altaj kono de la lingvo kaj aktiveco en la movado. Tiucele ni kontrastigis la totalajn valorojn de la respondoj kun kvin variabloj: aĝo, sekso, jaro de lernado de la lingvo, grado de kono de la lingvo kaj nivelo de aktiveco en la Esperantomovado. Aldone, la esploro inkluzivis ankaŭ la komparon de niaj rezultoj kun tiuj de aliaj esploroj prezentitaj en Forster (1982), Rašić (1994) kaj Stocker (1996). Ĝenerale la rezultoj montriĝis tre kongruaj, kaj ni en ĉi tiu referaĵo aludos al tiuj komparoj nur supraĵe<sup>2</sup>.

### 2 Kolektado de la donitaĵoj

En novembro 2007 estis lanĉita enketo. Ni uzis formularon kun 90 demandoj en la kataluna lingvo vortigitaj por tiu esploro.

Por entrepreni la esploron, la demandaron oni dissendis per Interreto kaj per konvencia poŝto. Per Interreto ĝi diskonigi inter diversaj retlistoj de la Kataluna Landaro kaj Hispanio kaj estis sendita al preskaŭ 100 individuaj adresoj, ĉefe de lernintoj, partoprenintoj en

<sup>1</sup> Plej elstaras la etnografiaj studoj de Martín (2003a, 2003b, 2004a, 2004b).

<sup>2</sup> Pli detalan katalunlingvan raporton pri la esploro eblas trovi en Alòs 2007 (268 p.), kvankam mankas en ĝi elementoj, kiujn havas ĉi tiu prezento.

Esperanto-renkontiĝoj kaj homoj, kiuj en la lastaj jaroj petis informojn aŭ librojn al Kataluna Esperanto-Asocio (KEA). Oni petis al aktivuloj kaj lokaj grupoj, ke ili diskonigu la enketon, ĉefe inter la nunaj lernantoj. Fine, oni kontaktis plurdekojn da unuopuloj memlernantaj en [www.lernu.net](http://www.lernu.net), same kiel kelkajn anojn de la socia reto [www.amikumu.net](http://www.amikumu.net), sen konata ligo kun la loka Esperanto-movado. Siavice, per ordinara poŝto la enketilo estis sendita al ĉ. 80 membroj de KEA, ĉefe veteranaj, kies ret-adreso ne estis konata. Plie, laŭlonge de la kvin-semajna kolektado de la respondoj ĉi tiuj estis kontrolataj por provi pliekvilibrigi la respondojn laŭ kriterioj de sekso, aĝo kaj membreco, denove invitante difinitajn celgrupojn respondi la enketon.

### 3 Difino de la celgrupo

Pluraj demandoj de la enketo celis enprofundiĝi en la difinon de la vorto “esperantisto”. Temas ja pri malklara termino, tamen abunde uzata, kie konkurencas la ideo, ke apartenas al tiu grupo la Esperanto-parolantoj, senrilate al sia apogo al iu idearo, kaj la sinteno, ke membras en ĝi tiaj homoj apogantaj idearon, sendepende de tio ĉu ili iam lernis la lingvon. La esprimitaj eksplicitaj opinioj estis ankaŭ konfrontitaj al aliaj respondoj de la enketitoj, tiel ke evidentiĝis, kiel ni vidas, ke, en tre larĝa proporcio, ambaŭ faktoroj – lingva kaj ideo – estas necesaj, por ke homoj agnosku sin esperantistoj kaj por ke aliaj ilin agnosku tiaj. Sekve, estis elektitaj nur la enketitoj loĝantaj en Sud-Katalunio, deklarintaj sin esperantistoj kaj iam lernintaj la lingvon. Fine, el 159 respondoj (131 el Sud-Katalunio), oni elektis 98 de homoj plenumantaj tiujn kriteriojn, kio estas la sampla, sur kiu baziĝas ĉi tiu esploro.

### 4 Fidindeco de la sampla

Esenca problemo de ĉiu enketo estas la reprezentiveco de la elektita sampla. Tiu ĉi aspekto estis analizita laŭ malsamaj flankoj.

La pezo inter neorganizitaj kaj organizitaj esperantistoj estas malklara, sed nia opinio estas, ke la elektita metodo ne subtaksas la unuajn.

Pli facile spurebla estas la eventualaj devioj laŭ sekso kaj/aŭ aĝo. La testo c2 inter la enketitoj apartenantaj al KEA kaj la donitaĵoj de tiu ĉi asocio donas validecon laŭ tiuj du variabloj, same kiel la testo laŭ sekso por la membroj de Hispana Esperanto-Federacio (HEF; ni ne disponas pri informoj pri aĝo por komparo<sup>3</sup>).

Alia afero estas la proporcio de membroj de tiuj du asocioj inter la enketitoj. Notindas la subreprezentigo de HEF-membroj inter la enketitoj: nur 6 enketitoj el entute 62 katalunaj HEF-membroj plenumis la elekto-kriteriojn (kontraŭ 62 el 202 por KEA). El tio ni eltiris, ke la sampla devias en difinita proporcio favore al KEA-membroj – sekve, al grupo principe pli juna kaj pli proksima al katalunismo.

Laste, la uzata metodo sekvigas, ke la plej aktivaj esperantistoj estas superreprezentitaj, ĉar ilia pli alta ligiteco al la grupo pli instigis ilin respondi la enketon. Tio klaras, se oni vidas, ke 17 el 62 KEA-membroj en la sampla sin taksas aktivuloj: en la realo, certe ne 27% de la membraro estas aktivaj agantoj, sed ĉ. 10%.

Surbaze de tiuj du konataj devioj, eblas konstrui pesitan mezumon de la respondoj. La rezultaj datumoj estus, ĝenerale, pli proksimaj al la realo, kvankam ankaŭ la plipezigo de la malgranda sampla de HEF-anoj povas malfidindigi kelkajn rezultojn. Sekve ni konsideris la pesitajn kaj nepesitajn rezultojn en ĉiu respondo kiel kontrastan datumon por la analizo, kaj montriĝis, ke plej ofte la diferencoj inter ili estas sensignifaj. Se oni ne eksplicitas tion, la rezultoj estos prezentitaj surbaze de la nepesitaj datumoj.

<sup>3</sup> La persona sperto montras, ke la meza aĝo de katalunaj HEF-anoj estas senteble pli alta ol tiu de KEA-anoj, kion konfirmas la enketo, ĉar aperas neniu membro de HEF sub 30 jaroj kaj du trionoj estas 60-jaraj aŭ pli.

Fine, menciindas ankaŭ, ke unu enketilo estis malakceptita pro manko de kompreno de la kataluna lingvo – tiu uzata en la enketilo –, kio kaŭzis plurajn nekongruajn respondojn kaj malfidindigis la tuton. Post esplorado, evidentiĝis, ke temas pri alilanda studento nur kelkmonate restanta en Katalunio. Do, la elektita lingvo por la enketilo iom deviigis la rezultojn: la kredo, ke ĉiuj esperantistoj en Katalunio lege komprenas la katalunan montriĝis erara.

Krome, aldonindas kelkaj komentoj pri la fidindeco de la respondoj:

- La 90-demanda enketilo povis kaŭzi multajn kontraŭdirojn en la respondoj. Tiu eblo estis sisteme analizita kaj tiaj okazoj montriĝis tre malmultaj.
- Evidentiĝas ie-tie eta antaŭvidebla ŝvelo de la respondoj en la direkto de favora bildo por la enketito: ekz. homoj pli emas aserti, ke ili parolas france, kvankam ili aliloke agnoskas, ke ilia lingvokono estas malalta, ol aserti, ke ili ne parolas ĝin, kvankam ili deklaras mezbonan nivelon.
- Komparoj estas faritaj kun oficialaj statistikoj, kiuj mem plej ofte baziĝas ankaŭ sur la asertoj de enketitoj, kaj mankas kialo por pensi, ke esperantistoj estas malpli (aŭ pli) fidindaj en siaj respondoj ol aliaj homoj.

## 5 Analizo de la datumoj

La datumojn de la katalunaj esperantistoj oni komparas kun tiuj de la kataluna socio, ĉefe eltiritaj de la Statistika Instituto de Katalunio (IDESCAT).

### 5.1 La esperantistoj kaj la kataluna socio

#### 5.1.1 Sekso

La donitajoj evidentiĝas fortan devion laŭ sekso inter la esperantistoj: 76% viroj kontraŭ 24% inoj. Estas konstatita fakto, ke inter la katalunaj membroj de asocioj estas vira plimulto (57% kontraŭ 43%), kaj ankaŭ en la studoj pri la esperantistoj en aliaj landoj oni trovas kvantojn de ĉ. du trionoj kontraŭ triono, sed tiu tendenco montriĝas pli ekstrema inter la katalunaj esperantistoj. Rimarkindas ankaŭ eĉ pli superaveraĝa kvanto de viroj inter la aktivuloj (86% kontraŭ 14%).

#### 5.1.2 Aĝo

La komparo de la distribuo laŭ aĝoj de la katalunaj esperantistoj montras rimarkindan similecon kun tiu de la landa loĝantaro. Tamen estas du faktoj aparte notindaj: krom eble en unu kazo, ne ŝajnas, ke nuntempe en Katalunio estas Esperanto-parolantoj sub 15 jaroj. Tiel la enketo montras 0% en la intervalo inter 0 kaj 9 jaroj<sup>4</sup>. Sed, ĉar en la sekva dek-jara intervalo egaligās la frekvencoj, ni devas konkludi, ke la ofteco de esperantistoj en la intervalo de 15 ĝis 19 jaroj duobligas tiun de la loĝantaro – kio estas komprenebla, ĉar pli ol duono de la esperantistoj lernas la lingvon inter 15 kaj 24 jaroj.

Alia okulkapta malsameco estas la diferenco en la du intervaloj inter 30 kaj 39 jaroj kaj inter 40 kaj 49: ĉi tie plej verŝajne la klarigo kuŝas precipe en tio, ke la movado rimarkinde fortis en la 1980-aj jaroj, sed trapasis aliĝ-krizon en la 1990-aj. Tial la demografiaj evoluoj de la du populacioj povas ne plene kongrui, ĉar ili povas sperti malsamajn fortojn.

	0-9	10-19	20-29	30-39	40-49	50-59	60-69	70-79	80+
<b>Katalunio</b>	10%	9%	15%	18%	15%	12%	9%	8%	4%
<b>Esperantistoj</b>	0%	8%	14%	10%	27%	14%	12%	7%	7%

Tabelo 1: Distribuo de la kataluna loĝantaro kaj de la esperantistoj laŭ aĝoj (pesitaj datumoj)

<sup>4</sup> Zorgante pri kiel eble plej granda anonimeco de la enketitoj pro la malgrandeco de la esplorita populacio, oni ne petis precizajn jarojn de naskiĝo, esperantistiĝo k.s., sed elektigis intervalojn.

Kutime en aliaj landoj aperas tendenco, laŭ kiu la mezaj generacioj estas subrepresentataj, dum ambaŭ flankaj aĝogrupoj superas sian frekvencon en la loĝantaro. Tiu distribuo ne aperas inter la katalunaj esperantistoj. Se ni komparas la tri segmentojn kun la proporcio de la loĝantaro kun 15 jaroj aŭ pli, ĉe la katalunaj esperantistoj la mezaj generacioj aperas laŭ praktike la sama proporcio de la ĝenerala loĝantaro (54% anstataŭ 53%), dum junuloj iomete pli oftas (25% kontraŭ 22%) kaj veteranoj iomete malpli (21% kontraŭ 25%).

### 5.1.3 Loĝado

La analizo de la distribuo de la esperantistoj laŭ la grandeco de la municipoj, kie ili loĝas, montras senteban devion al pli grandaj loĝpunktoj: la esperantismo estas ĉefe urba fenomeno. Tio estas aparte rimarkinda, se oni konsideras (kiel ni vidos poste), ke la esperantistoj estas klare katalunlingvaj, kio faciligus superrepresentiĝon de la mezaj kaj etaj municipoj, kiun ni ne havas.

### 5.1.4 Familia strukturo

La katalunaj esperantistoj inklinas al vivado en familioj pli malgrandaj ol kutime. Estas aparte notinda la nombro de homoj loĝantaj solaj, kiu atingas la duoblon de la landa mezumo. Tiu fakto ŝajnas ligita al sociekonomiaj indeksoj super la mezumaj.

### 5.1.5 Klereco

La esperantistaro havas klerecnivelon multe super la landa mezumo. Tion ne kaŭzas la fakto, ke la esperantistoj aĝas pli ol 15 jarojn – kaj, sekve, estas malmultaj homoj sen studoj –, nek ankaŭ manko de studentoj, ĉar 19% estas tiaj. Ili estas en tre larĝaj proporcioj universitataj diplomitoj: 49% deklaras esti finintaj superan klerecon, kontraŭ 18% de la kataluna loĝantaro. Eĉ inter la esperantistoj super 60 jaroj, 33% deklaras esti finintaj universitatan studon.

### 5.1.6 Okupoj kaj enspezoj

Inter la plej oftaj profesioj inter la esperantistoj elstaras la instruista (16%), multe super la kataluna loĝantaro, kie la instru-laboristoj ne atingas 1%. Substrekindas ankaŭ la alta nombro de komputistoj kaj inĝenieroj. Entute, tio parte kongruas kun la alta nivelo de klereco, sed samtempe la rezultoj evidentiĝas aparte grandan nombron de ŝtataj funkciuloj, same kiel okazas en aliaj landoj.

	Studentoj	Pensiuloj	Edukado	Komputiko kaj telekom.	Publika administrado	Inĝenieroj aŭ teknikistoj	Aliaj
<b>Totale</b>	19%	18%	16%	8%	6%	6%	26%

*Tabelo 2: Distribuo de la katalunaj esperantistoj laŭ okupoj*

Pro la alta klereco, estas antaŭvidebla enspez-nivelo super la mezuma kaj, aparte, malmultaj malaltaj salajroj, kion konfirmas la enketo. La labore aktivaj esperantistoj estas salajruloj kaj maloftas memstaruloj (5%) aŭ estroj aŭ entreprenistoj (3%), pro kio mankas ankaŭ tre altaj enspezoj. Ĝenerale, la esperantistoj apartenas al la meza aŭ mez-alta socia tavolo.

### 5.1.7 Origino

Kvankam granda parto de la kataluna loĝantaro naskiĝis ekster Katalunio kaj eĉ la plimulto havas patron kaj/aŭ patrinon naskiĝintan ekster ĝi, la katalunaj esperantistoj havas klaran aŭtoktonan devenon: 85% naskiĝis en Katalunio (kontraŭ 64% de la loĝantaro) kaj 72% havas patron tie naskitan (kontraŭ 40%).

Apartan mencion meritas la esperantistoj naskitaj ekster Hispanio, kiuj sumas 5% de la totalo. Ĉi tie ne ŝajnas tiel atentinda la nombra diferenco kun la kataluna loĝantaro (13% en 2007)<sup>5</sup>, sed pri la malsamaj deven-landoj – pri kio oni ne enketis, sed estas tre perceptebla fakto: apenaŭ estas esperantistoj devenantaj el Afriko aŭ Sud-Ameriko, kiuj konsistigas la vastan plimulton de la aliŝtat-devenaj katalunianoj, sed preskaŭ ĉiuj tiaj esperantistoj naskiĝis en Eŭropo.

Tamen la aliŝtata deveno estas atentokapta inter la vivkunuloj de la katalunaj esperantistoj: 17% de la pariĝintaj esperantistoj havas aliŝtat-devenan kunulon. Tio ne ŝajnas moderna fenomeno: tiu procento estas stabila tra la aĝogrupoj. Aliflanke la afero fariĝas rimarkinda ankaŭ se oni komparas ĝin kun la 3% de la pariĝintaj esperantistoj, kiuj havas vivkunulon naskitan en Hispanio (sen Katalunio). La katalunaj esperantistoj ŝajnas eksternorme inklini al trovado de vivkunulo ekster la ŝtataj landlimoj, kvazaŭ en iliaj personaj rilatoj Hispanio (sen Katalunio) havus pezon kompareblan al tiu de aliaj landoj.

### 5.1.8 Denaskaj kaj hejmaj lingvoj

La klara aŭtoktona deveno de la esperantistoj antaŭvidigas nombron de katalunlingvanoj super la mezuma, kion konfirmas la datumoj. Krome atentinda nombro de esperantistoj devenas el mikslingvaj familioj.

	(Nur) Kataluna	(Nur) Kataluna kaj hispana	(Nur) Hispana	Aliaj situacioj
<b>Katalunio (2003)</b>	40%	3%	54%	3%
<b>Esperantistoj</b>	61%	17%	14%	7%

*Tabelo 3: Denaskaj lingvoj de la kataluna loĝantaro kaj de la katalunaj esperantistoj*

Rimarkindas, ke neniu enketito deklaris Esperanton kiel denaskan lingvon, kvankam du deklaris, ke ili ĝin lernis antaŭ la dekjarigo.

Pri la lingvoj kutime uzataj hejme, la komparo kun la datumoj de la kataluna loĝantaro montras tendencon al la kataluna kaj al uzado de aliaj lingvoj: en 10% de la hejmoj, kie loĝas esperantisto, alia lingvo, krom la kataluna kaj la hispana, estas uzata (eventuale, aldone al unu el la du aŭ al ambaŭ).

Entute, el komparo de la respondoj pri denaskaj kaj hejmaj lingvoj inter la esperantistoj montriĝas tendenco al pli granda hejma uzado de la kataluna kaj al plurlingviĝo de la hejmoj, kio paralelas al la ĝenerala socio.

En la alilandaj esperantistaj enketoj demandoj pri denaskaj aŭ hejmaj lingvoj plej ofte forestas, tamen el siaj lingvodonitaĵoj la kataluniaj esperantistoj ŝajnas apartaj en tio, ke ili estas plimulte parolantoj de minorigita lingvo. La germania enketo, ekzemple, notas nur du parolantojn de la platdiĉa el 292 enketitoj (ĉ. dekonon de la proporcio en la landa loĝantaro) kaj neniu de la frisa aŭ la soraba. Estas kvar parolantoj de la dana, sed mankas indikoj, ĉu temas pri denaska lingvo (Stocker 1996: 33-34). En Finnlando, la denaskaj nefinnlingvaj esperantistoj estas 2,7% (Raŝić 1994: 65) kontraŭ duobla proporcio de denaskaj svedlingvanoj en la landa loĝantaro.

<sup>5</sup> Fakte, se la diferenco ne reduktiĝas, ĝi estos sendube atentinda en postaj jaroj, kiam la aliŝtat-devena loĝantaro pli firme establos sin. En la lasta jardeko estis granda kresko de tiu grupo en Katalunio (laŭ INE: 1996: 1,6%, 2001: 4,3%, 2007: 13,5%). Temas ĝenerale pri loĝantaro kun malaltaj enspezoj kaj longaj labortagoj, kiu i.a. devas lerni la lokajn lingvojn. Ili kutime devenas de landoj, kie Esperanto estas malmulte disvastiĝinta, kaj por ili, tute kompreneble, ĝi ne aperas inter la unuaj lernoprioritatoj en la nova hejmlando.

### 5.1.9 Lingvokonoj

Ĝuste unu el la plej karakterizaj trajtoj de la esperantistoj estas plurlingveco. La mezumo de la lingvoj parolataj inter la katalunaj esperantistoj estas 4,4. Tiu rezulto estas sufiĉe homogena kun tiu de la alilandaj esperantistoj (ĉefe kun la dulingva Finnlando) kaj samtempe, kiel en aliaj lokoj, klare super la nacia mezumo.

	Hispana	Kataluna	Esperanto	Angla	Franca	Itala	Germana	Araba
<b>Katalunio</b>	100%	78%	–	10%	8%	2%	1%	3%
<b>Esperantistoj</b>	100%	99%	76%	55%	52%	17%	13%	1%

*Tabelo 4: Distribuo de la kataluna loĝantaro kaj de la esperantistoj laŭ deklarita lingvokono (Fonto por Katalunio: Baròmetre de la comunicació i la cultura, novembro 2007<sup>6</sup>)*

Krom pri Esperanto, la komparo kun la kataluniaj donitaĵoj montras la saman ordon por la ses unuaj lingvoj: hispana, kataluna, angla, franca, itala kaj germana. Tamen, la katalunaj esperantistoj estas multe pli poliglotaĵoj: 40% deklaras paroli kvin aŭ pli da lingvoj.

Indas rimarki la pezon ĉe la esperantistoj de lingvoj malpli popularaj en la lando, kiel la rusa (6% da parolantoj), portugalo-galega (6%), eŭska (2%) kaj okcitana (2%), krom ankaŭ la bulgara, japana, persa, tahitia kaj la planlingvo toki pona – kun po unu enketito. Tendenco de la esperantistoj al interesiĝo pri malpli uzataj lingvoj jam estis rimarkita en Finnlando (Rašić 1994: 65) kaj troveblas ankaŭ en Germanio (Stocker 1996: 33-34).

### 5.1.10 Politika sinteno

La esperantistoj havas politikajn sintenojn tre malsamajn al la mezumo de la lando. Temas ĝenerale pri grupo sufiĉe politikema: nur 23 enketitoj esprimis, ke ili ne havas politikajn sintenojn<sup>7</sup>, kaj tri ne respondis. Tio estas malproksima de la sindeteno en la lastaj du voĉdonadoj, kiu atingis 46% kaj 43% de la elektantaro. Krome, dek enketitoj estas membroj de politika partio. Ĉar tri el ili estas movadaj aktivuloj kaj se oni konsideras la superreprezentigon de tiu grupo, tio pensigas pri grado de partianeco de ĉ. 8%: preskaŭ duoble super la 4,4% de la lando (Generalitat de Catalunya 2007: 29).

Antaŭ ol analizi la politikajn preferojn, necesas klarigi, ke la katalunian politikan arenon oni kutime analizas laŭ du sendependaj aksoj: dekstrismo-maldekstrismo kaj hispanismo-katalunismo. La diversaj politikaj proponoj okupas areojn en tiu du-dimensia spaco<sup>8</sup>.

Laŭ la enketo, pli ol 50% de la esperantistoj kun deklarita politika sinteno (kaj 40% de la totalo) esprimas sian preferon por sendependismaj partioj, ĉefe ERC (kaj tio restas tre larĝe plimulta en la pesitaj kalkuloj). Kontraŭe, en la elektoj de 2006 kaj 2007 tiuj partioj atingis inter 12% kaj 14% de la voĉdonoj.

En la dua loko, kaj kun pli ol notindaj 24%, troviĝas la ruĝverda koalicio ICV-EUiA (kontraŭ 9-10% en la elektoj de 2006-2007). La du grandaj partioj, la dekstraj katalunistoj

<sup>6</sup> Tonkin prave skeptikas pri statistikado de lingvokonoj (Tonkin 2006: 124). La gapigaj datumoj de IDESCAT pri “flua parolado” de fremdaj lingvoj (2003) prezentas duoble pli altajn nombrojn: 22% por la angla, 15% por la franca ktp.

<sup>7</sup> Tamen, necesas konsideri, ke ses simpatiantoj de anarkiismaj sindikatoj staras en tiu kategorio.

<sup>8</sup> En tiu spaco, la ĉefaj partioj okupas la sekvajn areojn: PP (dekstrisma, hispanisma; 10-11% el la voĉoj en la balotoj de 2006 kaj 2007), CiU (dekstrisma, katalunisma; 25-32%), Ciutadans (centrismo, radikale hispanisma; 2-3%), PSC (modere maldekstrisma, modere katalunisma; 27-32%), ERC (modere maldekstrisma, radikale katalunisma; 12-14%), ICV-EUiA (maldekstrisma, modere katalunisma; 9-10%). Entute, voĉoj laŭ la akso dekstrismo-maldekstrismo estas relative egale distribuitaj en la socio (kun tendenco al la maldekstrismo), sed en la akso hispanismo-katalunismo ĉiam regas fortega malekvilibro favora al la katalunismo, kaj sekve oni ofte subdividas ĝin inter diversaj tendencoj, de federaciismo (“modera katalunismo”) ĝis sendependismo (“radikala katalunismo”).

CiU kaj la socialistoj PSC, havas minoritatan subtenon de, respektive, 7% kaj 6% (kontraŭ po 25%-32%). Nur unu enketito montris sian simpatian por unu el la du nete por-hispanaj partioj (PP kaj Ciudadans), dum ili kune ricevis 12-13,5% en la elektoj de 2006 kaj 2007.

Ni povas konkludi, ke la katalunaj esperantistoj tre klare inklinas al sendependismo kaj la ekologiisma maldekstro, kvankam ĉiuj partioj estas reprezentitaj en la kataluna esperantistaro krom, praktike, la naciisma hispana dekstro.

Ĉe la sindikatoj, la tendencoj ne estas malpli eksternormaj. 44 enketitoj esprimis simpatiojn por unu aŭ alia sindikato – profesia aŭ studenta –, el kiuj 12 subtenas la anarkiisman CNT. Sekvas la ekskomunisma CCOO (plimulta en Katalunio, kun 44% de la sindikataj delegitoj), kun naŭ simpatiantoj, kaj la anarkiisma CGT kun kvar (2% de la delegitoj)<sup>9</sup>. La socialisma UGT ricevis kvin subtenojn, malgraŭ ties 41% de la katalunaj sindikataj delegitoj.

Adiciante CNT kaj CGT, ni povas konkludi, ke la liberecana movado havas signifan pezon en la kataluna esperantistaro, kvankam malpli fortan ol la sendependismo. Ĉiuokaze, por difinita nombro da homoj, anarkiismo kaj sendependismo ne estas kontraŭdiraj, ĉar ni trovis kvin enketitojn kun simpatioj por ambaŭ.

La rezultoj akordas kun la kvalite orientitaj esploroj de la kataluna esperantistaro de Germà Martín, kies intervjuoj, en mempercepta ideologia skalo, kie 0 estas la ekstrema maldekstro kaj 10 la ekstrema dekstro, lokis sin en valoroj inter 0 kaj 4 (Martín 2004b: 17).

Antaŭnelonga esploro de la Centro pri Opini-Studoj, dependanta de la katalunia registaro, analizis la voĉdonajn tendencojn kiel eksteriĝon de sistemo de valoroj de la individuoj, surbaze de la Teorio de la Bazaj Valoroj, unuafoje difinita de Shalom H. Schwartz. Tiu teorio identigas dek bazajn valorojn, validajn por ĉiuj kulturoj en la mondo (Centre d'Estudis d'Opinió 2007: 5). La kataluna laboraĵo deiras de tiu ĉi modelo kaj korelaciigas tiujn valorojn kun la voĉdono por difinitaj politikaj partioj. Inter ili ekzistas tri valoroj kun forta pozitiva korelacio al voĉdonantoj de la ruĝverda ICV-EUiA kaj la sendependisma ERC kaj tri aliaj kun forta negativa korelacio.

La pozitiva korelacio aperas kun “stimula vivo”, “universalismo” kaj “memdirektado”. Ili estas respektive difinitaj kiel “ekscita vivo, novaĵoj kaj defioj en la vivo”, “kompreno, toleremo kaj zorgo pri ĉies bonfarto kaj la protekto de la medio” kaj “deziro konservi la sendependon de penso kaj agado; elekto, kreiveco kaj esploro”. Male, la valoroj kontraŭaj al la voĉdonantoj de la du plimultaj politikaj grupoj inter la esperantistoj estas “sekureco”, “konsentemo” kaj “tradicio”, respektive difinitaj kiel “sekureco, harmonio kaj stabilo de la socio, de la rilatoj kaj de si mem”, “subpremado de la agoj, inklinoj kaj impulsoj, kiuj povas ĝeni aŭ damaĝi la aliajn, elrevigi la socialajn antaŭjuĝojn aŭ rompi la normojn” kaj “respekto, akceptemo kaj sekvo de la kutimoj kaj ideoj de la tradicia kulturo aŭ la religio” (Centre d'Estudis d'Opinió 2007: 77).

Tiu modelo ŝajnas aparte taŭga por nia esploro, ĉar ĝi permesas ligi la voĉdonajn preferojn kun aro da valoroj kaj sintenoj, tiel ke ni trovas, ke la politikaj preferoj de la esperantistoj plene kongruas kun la idealismo kaj la nekonformismo montritaj en multaj respondoj al la demandaro – trajtoj, kiuj estas abunde substrekitaj en la esploroj de Forster pri la britaj kaj de Stocker pri la germanaj esperantistoj.

### 5.1.11 Religio

Ankaŭ religio montras klaran diferencon inter esperantistoj kaj la tuto de la kataluna loĝantaro. La kvanto de katolikaj esperantistoj ne atingas 20% kaj estas triono de la landa mezumo. Ĝi estas krome forte korelaciita kun la aĝo: nur unu el 25 enketitoj sub 30 jaroj deklaras sin katoliko. Ateistoj kaj agnostikuloj konsistigas la absolutan plimulton

<sup>9</sup> CGT, kontraŭe al CNT, kandidatiĝas en la elektoj por sindikataj delegitoj.

(55% kontraŭ 30-35% en la kataluna socio, depende de la elektita esploro), dum la nombro de alireligianoj superas 10% (inter kiuj la duono estas nekatolikaj kristanoj), kontraŭ 2-3% de la tuta loĝantaro.

Tiuj rezultoj kongruas kun tiuj en aliaj landoj, kiel Britio kaj Germanio, kie ateistoj kaj agnostikuloj, unuflanke, kaj membroj de malplimultaj religioj montriĝas supermezume reprezentitaj. Post detala analizo, Forster konkludis, ke la britaj esperantistoj estas pli konsciaj pri sia religieco kaj pli emas esti praktikantaj kredantoj aŭ deklari sin nekredantoj, kion Stocker subtenas por la germanaj esperantistoj (“esperantistoj ŝajne ne emas membriĝi en religio nur surpapere”, Stocker 1996: 27).

### 5.1.12 Asociemo

La esperantistoj havas tre altan nivelon de partopreno en ne-Esperantaj asocioj: 74 el la 98 enketitoj deklaras membri en almenaŭ unu, kontraŭ la landa mezumo de 46%. Ne estas strange pensi, ke grupo, en kiu abundas membroj de Esperanto-societoj, inkludas al partopreno en pliaj asocioj: laŭ IDESCAT, la membroj de katalunaj asocioj membras mezume en 1,5 organizoj. En nia esploro, 36 enketitoj deklaris membri en unu aŭ pli da neregistaraj organizoj pri disvolvado, unu aŭ pli da asocioj por homaj rajtoj, aŭ unu aŭ pli da ekologiismaj asocioj (el kiuj 12 al pli ol unu tipo de tiaj organizoj), dum nur 15% de la katalunaj ne-Esperantaj asocioj membras en tiuj tipoj de organizoj. La ofteco estas pli ol duobla, kaj ni povas kredi, ke tio rilatas al la ideologia proksimeco de la Esperanto-movado kun homaj rajtoj, tiel ke konsiderinda parto de la esperantistoj montriĝas anoj de similcelaj asocioj.

Pri la membreco en politika partio aŭ sindikato, 19 enketitoj deklaris sian membrecon en almenaŭ unu el la du tipoj (22, se oni konsideras ankaŭ la studentajn sindikatojn). Denove, temas pri kvanto larĝe super la 8% de la landa mezumo, sed praktike egala al la 19% de la katalunaj ne-Esperantaj asocioj membrantaj en tiaj organizoj.

### 5.1.13 Libertempo kaj ŝat-okupoj

La esperantistoj plimulte deklaras, ke ili pasigas sian libertempon legante aŭ, dualoke, antaŭ la komputilo. La televido ne aperas ĝis la oka loko, kun nur 33% de la enketitoj, malantaŭ la kunlaboro kun politika partio, sindikato aŭ asocio. Kvankam temas tre probable pri subtakso, aliaj kongruaj respondoj permesas konsideri ĝin fidinda tendenco.

Tiel, legado estas larĝe la plej populara ŝat-okupo inter la esperantistoj: 75% elektis ĝin. Sekvas ĝin je ioma distanco vojaĝoj, muziko kaj lingvoj. Ĉi-lasta aserto tute ne devas surprizi en poliglota komunumo ligita per la lernado de lingvo, kiu, krome, havas malmultan ekonomian valoron.

Kaj, efektive, kiel informas tria demando de la enketilo, legado ŝajnas grava por la esperantistoj, ĉar triono asertas, ke ili legas pli ol po unu libron monate. La nombro de esperantistoj legantaj malpli ol unu libron en la jaro estas 3%, dum legas neniam aŭ preskaŭ neniam 28% de la landa loĝantaro.

Ankaŭ la legado de jurnaloj montriĝas senteble super la landa mezumo.

Fine, la uzado de Interreto atingas 77% de la enketitoj. Ĉi tiu datumo estas supertaksita pro la devioj diskutitaj en la komenco de ĉi tiu referaĵo, sed la ĝusta kvanto ne ŝajnas malproksimi de du trionoj. Kiel en la aliaj donitaĵoj, pluraj faktoroj adiciiĝas, interalie la supermezumaj klerecnivelo kaj aĉetkapablo, sed ĉi tie necesas la enkalkulo de du pliaj elementoj: la granda nombro de komputistoj kaj la granda faciligo per la reto de la praktikado de Esperanto kun alilandanoj. Eblus aldoni eĉ trian: la investadon de la Esperanto-movado en retaj metodoj en la lastaj jaroj, tiel ke 18 enketitoj lernis la lingvon per la reto. Estas normale, do, ke homoj tiel aliĝintaj al la grupo estas pli inklinaj ol ordinare al la uzado de Interreto.



## 5.2 La esperantistoj kaj la esperantismo

### 5.2.1 Unua kontakto, kialoj de lernado kaj de restado

Preskaŭ duono de la esperantistoj kontaktas Esperanton per la familio aŭ amikoj, kvankam tiu proporcio malaltiĝis en la pasintaj kvin jaroj per la impeto de Interreto, kiu fariĝis la unua kontakto-formo por triono de la homoj, je la sama nivelo kiel la aliro per proksimuloj.

Tamen, kvankam la unua kontakto okazas ofte per familiano, nur en 5% de la okazoj la esperantistoj konsideras, ke la familio estas la precipa kialo de ilia decido lerni la lingvon. La duono asertas, ke ili eklernis Esperanton, ĉar ili apogas la ideon malantaŭ ĝi. Je konsiderinda distanco, 17% deklaras, ke ili tion faris, ĉar ili ŝatas lingvojn kaj 14% pro sola scivolemo.

Cetere, la lernado de Esperanto plej ofte ne okazis tuj post la unua kontakto kun ĝi: por ĉ. 60% de la enketitoj tio ne okazis pli frue ol monaton poste; kaj por ĉ. 40%, post jaro aŭ pli.

Aliflanke, oni kontraŭstarigis plurajn parojn da ebloj en kvin-nivela skalo por kompreni diversajn starpunktojn de la esperantistoj, kaj kio ligas ilin al la grupo. Per tio, ni ekscias, ke la aserton pri idealismaj kialoj por la lernado de Esperanto subtenas aliaj respondoj al la demandaro: 40% asertas, ke ili partoprenas en la Esperanto-movado, ĉar ili deziras ŝanĝi la socion, kontraŭ 19% de la asertantoj, ke ili tion faras, ĉar ili fartas bone en la grupo (la ceteraj staras meze inter tiuj du kontraŭstarigitaj ebloj). Ankaŭ pli ol la duono esprimas, ke la Esperanto-movado povas ŝanĝi la socion, dum nur 13% konsideras, ke tio ne eblas. Tiuj proporcioj restas samaj, kiam oni prezentas la elekton, ĉu la Esperanto-movado devas klopodi ŝanĝi la socion aŭ ĉu ĝi devas orientiĝi internen kaj krei pli da literaturo, muziko kaj servoj en Esperanto<sup>10</sup>. Same okazas, kiam oni petas decidi, ĉu oni konsideras pli grava la idealon de paco kaj justo danke al neŭtrala lingvo aŭ la praktikajn avantaĝojn de internacia lingvo en kongresoj, komerco kaj turismo. Kvankam tiuj ĉi proporcioj aperas korektitaj en la direkto de pli realismaj pozicioj en la pesitaj mezumoj, la ĝenerala aspekto restas plene senŝanĝa. Entute, tio montras la pli fortan pezon de idealismo inter la aktivuloj, kompare kun la ceteraj esperantistoj, kio verŝajne estas elemento faciliganta ilian pli grandan engaĝiĝon en la Esperanto-movado.

Ĝuste la alilandaj esploroj pri Esperanto montras tiun klaran inklinon de esperantistoj al idealismo, tamen kompare kun la germania esploro ŝajnas, ke ideaj konsideroj pli forte rolas en Katalunio. Ja en lando kun alta procento de parolantoj de minorigita lingvo slogano, kia “Esperanto, dua lingvo por ĉiuj”, prenas multe pli fortan signifon. Informado substrekanta tiun aspekton de Esperanto (super ekz. facileco de transnaciaj kontaktoj) pli efikas ĉe parto de la loĝantaro pli sentema al ĝi, kaj tiu nova generacio, aktiviĝinte, siavice emas plu substreki tiun aspekton, gravan por ili.

### 5.2.2 Esperantistaj familianoj

Kiel ni vidis, la familio ne ŝajnas multe influi en la esperantistiĝo. La demando pri esperantistaj familianoj parte subtenas tion, sed samtempe aldonas neantaŭviditajn rezultojn. Tiel, la nombro de samsangaj esperantistaj familianoj (gepatroj, gefiloj aŭ gefratoj) situas inter 6% kaj 8%, kio tute proksimas al 5% de la homoj, kiuj deklaris esti lernintaj Esperanton pro familiano. Kontraŭe, surprizas 17% de la enketitoj, kiuj deklaras havi aŭ esti havintaj esperantistan vivkunulon.

Surbaze de tiuj 5%, kiuj deklaris esti lernintaj Esperanton pro familiano, la datumo montras, ke temas ĉefe pri pariĝoj inter jamaj membroj de la komunumo, anstataŭ pri

<sup>10</sup> Tonkin prave rimarkigas, en rilato al la esploro de Stocker, ke studo, kies sampla estas membroj de Esperanto-asocio, verŝajne ne povas determini la kvanton de “raŭmismoj”, se entute tiu kategorio ekzistas, ĉar ĝi pli similas al parto de kontinuumo (Tonkin 2006: 116). Tiun problemon oni principe ne suferas ĉi tie.

homoj, kiuj fariĝis esperantistoj pro sia rilato kun esperantisto. La afero estas klarigebla, kiel ni poste vidos, pro la konsiderinda nombro da esperantistoj, kiuj estas aŭ estis aktivaj en la Esperanto-movado, tiel ke, se oni pasigas multe da tempo en difinita kolektivo – aparte, en jun-aĝo, la tipa periodo por renkonti paron – tiun ĉi oni ne malofte trovos interne de la grupo.

### 5.2.3 Lerno-aĝo

Oni kutime lernas Esperanton inter la 15-a kaj la 30-a vivojaroj, kun maksimumo inter la 15-a kaj 19-a. En tiu 15-jara periodo lernas la lingvon ĉ. 60% de la esperantistoj. La pinta periodo estas la universitata, kvankam pliaj ĉ. 30% lernas la lingvon inter 30 kaj 50 jaroj.

### 5.2.4 Lernoformo

Esperanton oni lernis preskaŭ je egalaj kvantoj en regulaj kursoj kaj per memlernado, kvankam en la lastaj kvin jaroj la pezo de Interreto malekvilibrigas la egalecon al la flanko de la memlernaj metodoj<sup>11</sup>. Siavice, la lernado de Esperanto en la familio okazas tre malofte (3%).

### 5.2.5 Lingvokono

Malgraŭ la argumento ripetata de la Esperanto-propagando, ke Esperanto estas tre facila, nur duono de la esperantistoj deklaras paroli ĝin bone aŭ tre bone. 20% konsideras, ke ili havas malaltan lingvonivelon kaj kvarono agnoskas tre malaltan<sup>12</sup>.

La grupo plej bone reganta la lingvon estas la aktivula, kio estis antaŭvidebla: temas pri la homoj, kiuj plej multe uzas ĝin (parole, lege kaj skribe), partoprenas plej ofte en la aranĝoj kaj abonas plej multe da revuoj. Aliflanke, la engaĝiĝo en la Esperanto-movado montras pli fortan kor-inklinon al la lingvo, kio faciligas ties regadon. Sekve, tiuj, kiuj nun aliĝas al la grupo kaj kiuj ankoraŭ ne atingis altan lingvokapablon, plej ofte sukcesos en tio post nelonge danke al sia regula lingvo-uzado.

Aliflanke, evidentiĝas ŝoka regreso de la elcento de inoj en la plej altaj niveloj de lingvokono, kiel montras tabelo 5.

		<b>Totalo</b>	<b>Inoj</b>	<b>Viroj</b>
<b>Totalo</b>		100%	24%	76%
<b>Aktivuloj</b>		19%	16%	84%
<b>Kono de Esperanto</b>	Tre malalta	26%	36%	64%
	Malalta	20%	30%	70%
	Meza	32%	23%	77%
	Alta	22%	9%	91%

*Tabelo 5: Kono de Esperanto laŭ sekso*

Tre povas esti, ke la subjektiva takso pri la propra lingvokono ne estas la sama ĉe inoj kaj ĉe viroj, tamen tio malsufiĉas por klarigi tiujn rezultojn. Nia ĉefa klarigo estas, ke viroj pli aktivis en la movado kaj tio kaŭzas pli altan lingvokonon, tamen la distanco inter la seksoj estas tiel granda, ke necesas pli detala esploro por bone kompreni – kaj eviti – la fenomenon.

<sup>11</sup> Leviĝis la demando, ĉu la memlernaj metodoj en Interreto kaŭzas la altan nombron de komputistoj inter la esperantistoj. Ne ŝajnas tiel: el la ok enketitaj komputistoj, nur du lernis ĝin tiamaniere.

<sup>12</sup> La enketo ne sufiĉe esploris la distingon inter diversaj lingvokonoj: pro tio, ke superregas la lega uzado, estus tre oportune distingi inter la diversaj kapabloj legi, skribi kaj paroli la lingvon.

### 5.2.6 Membreco en Esperanto-asocioj

Ne ĉiuj esperantistoj membras en Esperanto-asocio: tiel okazas ĉe 30% el la enketitoj. Tiu elcento proksimiĝas al 60%, se oni konsideras nur la lernintojn en la lastaj 5 jaroj, sed plu estas 20% inter la lernintoj en la lastaj 20, dum ĝi reduktiĝas ĝis 5% inter la esperantistoj ekde pli ol 20 jaroj. Ju pli longe oni estas esperantisto, des pli kreskas la proporcio de membreco en asocio: tendence, konservas sian ligon al Esperanto nur tiuj, kiuj membras en asocio.

Plej multe, la membriĝo okazas en naciaj Esperanto-asocioj. 20% estas anoj de lokaj grupoj, kvankam ĉi societoj altiras malmultajn nombrojn en la lastaj 20 jaroj, laŭ la donitaĵoj. 20% de la katalunaj esperantistoj estas individuaj membroj de UEA. La restantaj asocioj havas malpli grandan pezon. Rimarkindas la profesiaj asocioj (instruistoj, fervojistoj, komercistoj, kun entute naŭ aliĝoj), la politikaj (SAT, etnistoj, kun sep aliĝintoj), la katolikaj (tri) kaj la humanecaj (ankaŭ tri).

### 5.2.7 Abono de revuoj

La Esperanto-gazetoj, kiujn ricevas la esperantistoj, estas tre ligitaj al la asocioj, en kiuj ili membras. Fakte, ankaŭ ĉi tie triono de la esperantistoj abonas neniun revuon en la internacia lingvo. Tamen duono de la abonantoj abonas pli ol unu revuon, tiel ke, mezume, ĉiu esperantisto ricevas 1,5 gazetojn en Esperanto<sup>13</sup>.

Krom la bultenoj eldonitaj de diversaj naciaj asocioj, kiel *Kataluna Esperantisto*, la plej populara eldonaĵo estas *Esperanto*, kun 17 abonantoj. Tri aliaj revuoj pri la Esperanto-movado – *La Ondo de Esperanto*, *Tejo Tutmonde* kaj *Heroldo de Esperanto* – kune atingas 11 abonantojn. *Monato* havas 14, *Kontakto* 6 abonantojn. Aliaj kvar kulturaj kaj beletraj eldonaĵoj entute kunigas 5 abonantojn.

### 5.2.8 Legado de libroj

Ĉirkaŭ 35% de la katalunaj esperantistoj deklaras legi jare po unu aŭ pli da libroj en Esperanto. Tio logike tre dependas de la lingvonivelo: se oni flankenlasas la homojn kun tre malalta nivelo, la kvanto altiĝas ĝis 47% kaj, se oni konsideras nur la homojn kun alta aŭ tre alta nivelo, oni atingas 57%. La deklaroj ŝajnas iom altaj, ne tre kongruaj kun la bildo, kiun oni havas pri la esperantistoj, nek kun la nombro de libroj aperantaj jare en Esperanto kaj ties eldonkvanto. En venontaj okazoj, kroma demando pri la laste legita libro verŝajne plifidindigus la rezulton. Fakte, kiel en la germania esploro, kie 22,4% asertis, ke ili posedas pli ol 50 Esperanto-librojn (Stocker 1996: 77), eblas sin demandi, kion precize esperantistoj juĝas libro.

### 5.2.9 Ofteco de uzado

De sia lanĉo, plej ofte Esperanto estas lingvo pli skriba ol parola pro la diseco de ĝiaj uzantoj, kvankam fojfoje ĝi povas fariĝi eĉ hejma lingvo. La enketo konfirmas tion: la lega uzado estas la plej ofta, dum la skriba sekvas sufiĉe malantaŭe kaj lastaloke situas la parola. La donitaĵoj tre dependas de la lingvonivelo kaj de la grado de aktiveco. Tial ĉiutaga lega uzado okazas en 20% de la enketitoj (12% laŭ pesitaj datumoj), sed en 59% de la fluaj parolantoj; male, ĉiutaga parola uzado okazas nur ĉe du enketitoj (plej verŝajne paro), kiuj havas ĝin kiel familian lingvon. Se oni rigardas la uzojn faratajn po unu aŭ pli da fojoj semajne, preskaŭ la duono de la esperantistoj uzas la lingvon por legi, 15% por skribi kaj 10% por paroli –

<sup>13</sup> Ofte la lokaj grupoj abonas plurajn revuojn, do iliaj frekventantoj povas esti regulaj legantoj de pli da eldonaĵoj ol da tiuj, kiujn ili unuope abonas. Tamen la nemulta pezo de la lokaj grupoj kredigas, ke tiu faktoro ne ludas aparte signifan rolon.

laŭ la pesitaj datumoj – , dum por la fluaj parolantoj temas pri kuranta lingvo kun pli ol 80% legantaj, pli ol 60% skribantaj kaj pli ol 35% parolantaj ĝin.

### 5.2.10 Aktiveco

La grado de aktiveco inter la esperantistoj estas konsiderinda, kvankam ne ekstrema<sup>14</sup>. Ĉirkaŭ 6% asertas, ke ili kunlaboras sufiĉe multe aŭ multe kun la Esperanto-movado, dum aliaj 14% asertas, ke ili tion iom faras. Pliaj 24% asertas, ke ili ne nun faras tion, sed faris iam. Do iom pli ol 40% de la esperantistoj estas aŭ estis iel aktivaj en la movado. Aparte, triono de la esperantistoj deklaras, ke ili instruis Esperanton kaj kvarono tion faris dum unu jaro aŭ pli. Ĉirkaŭ 30% diras, ke ili havas aŭ havis postenon en la Esperanto-movado, preskaŭ ĉiam je loka aŭ nacia nivelo, kaj tre malofte je internacia.

Tiun altan gradon de engaĝiĝo, iam en la vivo, sekvas, kiel ni vidis, konsiderinda nombro de pariĝoj inter esperantistoj. Kiagrade la grupo estas fermita, aperas kiel logika demando. Pli ol la duono de la enketitoj asertas, ke ili havas malmultajn esperantistajn amikojn, dum kvarono asertas, ke ili havas sufiĉe multajn. Tamen, pro kompreneblaj kialoj, tiuj proporcioj inversiĝas ĉe la aktivuloj.

La esperantistoj, do, montriĝas kiel bone interligita grupo, aktiva interne sed samtempe malfermitaj al kontakto kun aliaj homoj – kiel montras ilia alta partopreno en asocioj kaj partioj kaj iliaj libertempaj okupoj. Fakte, 70% deklaras sin aktivaj homoj (triono, tre aktivaj) kaj du trionoj, kunlaboremaj (20%, tre kunlaboremaj).

Aliflanke, la analizo de la respondoj pri la strukturo de la hejmoj montras, ke la aktiveco estas forte korelaciita kun la manko de kunloĝantaj gefiloj.

### 5.2.11 Grupa difino

Malgraŭ la elasteco de la vorto, diskutita pli supre, la esperantistoj – ne gravas la difino – kutime ne malakceptas por si la terminon, kvankam iu povas foje plendi pri la finaĵo “-ist” (kiu en la kataluna havas la samajn signifojn kiel en Esperanto)<sup>15</sup>. Ni vidis, ke la deziro iel ŝanĝi la socion per Esperanto estis larĝe plimulta en la grupo, kaj ke ties membroj ofte ligiĝas al organizoj strebantaj al socia transformo. En la enketo oni celis esplori la pezon de la du faktoroj lingvo kaj idearo, principe akceptante ilin kvazaŭ sendependajn elementojn kombineblajn inter si, t.e. kun entute kvar kombin-eblecoj. Tamen, la eblon “nek paroli la lingvon, nek dividi idearon” ni ne konsideris akceptebla por esperantistoj, dum ni enkondukis plian eblon, “aŭ paroli la lingvon, aŭ dividi idearon”, t.e. negrave kiu el la du faktoroj. Tiucele ni demandis, ĉu esti esperantisto signifas nur paroli la lingvon, aŭ nur dividi iuspecan idearon, aŭ eble necesas ambaŭ kondiĉoj, aŭ eble sufiĉas iu ajn el la du.

Neniu el la kvar ebloj montriĝis klare plimulta. La plej akceptita estas, ke iu ajn el la du faktoroj sufiĉas por konsideri iun esperantisto (38 enketitoj), dum 31 taksas, ke necesas ambaŭ. La malplej elektita estis, ke sufiĉas akcepti idearon (11 enketitoj), dum meze staras tiuj, kiuj opinias, ke lingvo sufiĉas (18 enketitoj).

Estas interese atenti ne nur pri tio, kion asertas la enketitoj, sed analizi, ĉu ili estas konsekvencaj kun sia propra difino pri esperantisteco. Tiucele ni pritraktis la tuton de la 131 kataluniaj enketitoj kun validaj respondoj, el kiuj 33 ne konsideras sin esperantistoj. El tiuj 33, 15 taksas, ke por esti esperantisto sufiĉas dividi idearon (aŭ iu ajn el la du ebloj) kaj samtempe deklaras sin favoraj al Esperanto (11, tre favoraj). Do, malgraŭ ilia aserto, ŝajne

<sup>14</sup> Kiel en la antaŭa paragrafo, oni prezentas ĉi tie pesitajn datumojn, kiuj montriĝas senteble malsamaj al la rekte ricevitaĵoj de la enketitoj, kiel estis, cetere, antaŭvideble.

<sup>15</sup> Entute estas 8 enketitoj (el 159), kiuj ne konsideras sin esperantistoj, sed membras en Esperanto-asocio: eble indas parte serĉi la kialon de tiu elekto en la “isteco”.

por ili necesas ankaŭ ia grado de lingvokono, kiun ili ne atingas. Male, por 8 homoj sufiĉas scipovi la lingvon (aŭ kiu ajn el la du ebloj) kaj ili havas iomajn sciojn, sed ili ne konsideras sin esperantistoj (5 iom komprenas, du iom parolas kaj unu eĉ parolas ĝin flue<sup>16</sup>). Por ili, do, necesas pli profunda lingvokono aŭ eble ankaŭ divido de idearo, kiun ili ne (sufiĉe) apogas.

Se oni rigardas la aferon el alia flanko, el la homoj deklarantaj sin esperantistoj, 6 enketitoj opinias, ke por esti esperantisto sufiĉas la lingvo (aŭ iu ajn el la du ebloj), sed havas tre malaltan nivelon (4 eklernis ĝin sed ne daŭrigis kaj du iam ĝin lernis, sed forgesis la lingvon). Ŝajne por ili sufiĉas tre malalta lingvonivelo aŭ necesas konsideri, ke ankaŭ divido de idearo ludas rolon. Aliflanke, estas neniu homo subtenanta, ke por esti esperantisto sufiĉas ideoj (aŭ iu ajn el la du ebloj), kaj ne dividanta ilin, kvankam li deklaras sin esperantisto.

El ĉio ĉi eblas konkludi, ke, kvankam oni foje asertas ion alian, por la plimulto de la esperantistoj (kaj de homoj proksimaj al la Esperanto-movado) necesas ioma grado kaj de lingvokono kaj de divido de idearo. Ĝenerale, la grupo montriĝas malfermita kaj toleras same malaltan lingvokonon kiel tre malklaran difinon de tiu komuna idearo. Tiu idearo, ekzemple, ne nepre enhavas tion, ke Esperanton oni instruu en la lernejoj, aŭ ke Eŭropa Unio alprenu ĝin, kvankam temas pri deziroj larĝe plimultaj en la grupo, kun respektive 87% kaj 73% de la apogoj.

### 5.2.12 Antaŭjuĝoj

Sekvante la enketon de Raŝić – kiu celis esplori, ĉu la esperantistoj estas pli imunaj al grupaj kliŝoj ol neesperantistoj – ni deziris enketi pri la antaŭjuĝoj de la esperantistoj, demandante ilian simpatian aŭ malsimpatian al aro da ŝtatoj, lingvoj kaj religioj. Tiuj demandoj kaŭzis plurajn komentojn, same en la procezo de elprovo de la enketilo antaŭ ties distribuo, kiel dum la ricevado de la respondoj. Bona montrado de tiuj kontraŭkliŝaj reagoj estas tiu de unu el la testantoj: “Mi ne scias, kiu estas la intenco, sed mi esperas, ke se vi sendas tion al la esperantistoj, ĉiuj amase respondos, ke ili havas nek simpatian nek malsimpatian al iu ajn lingvo, lando aŭ religio. Mi, ekzemple, povas tre kontraŭi la politikon de la franca registaro, sed senti grandan simpatian por franca amiko.”

Evidente, la celo de la demando ne estis la konsidero, kiun eventuale la esperantistoj havas pri la tuto de la 300 milionoj da usonanoj, sed ĉu ili efektive havas opinion, kaj ĉu ĝi estas malsama al tiu pri la 70 milionoj da irananoj. La hipotezo, kiun oni celis testi, esprimita de Raŝić, estis, ke ekzistas ĉe la esperantistoj supernorma malfermiĝemo al aliaj landoj, trans la antaŭjuĝoj. Tiusence, ne estas tiel interesa la starpunkto pri unu difinita lando, sed ĉu ĝi ŝanĝiĝas de unu lando al alia, de unu lingvo al alia, aŭ de unu religio al alia. Do, interesis nin fakte pli la mezuro de la varianco inter la respondoj de ĉiu individuo, ol la mezumo de la respondoj al la unuopaj demandoj.

La rezulto montriĝis pli kompleksa ol tiu prezentita de Raŝić, kiu en sia enketo ne analizis la diferencojn inter la diversaj respondoj de la individuoj, sed nur la distribuon de la unuopaj respondoj, kiuj pli-malpli sekvas Gauss-kurbon iom deflankigitan en la direkto de la pozitiva flanko. Ni kredis, ke ni tion trovos, sed aperis iom alia distribuo.

Estas enketitoj – foje favoraj al anarkiismo – sisteme deklarantaj, ke ĉiuj ŝtatoj estas malsimpatiaj aŭ tre malsimpatiaj (sendistinge inter ili) kaj ke ĉiuj religioj estas malsimpatiaj aŭ tre malsimpatiaj (foje, escepte de budhismo). Kontraŭe, alia enketito taksas ĉiujn ŝtatojn, lingvojn kaj religiojn “tre simpatiaj”. Por tria, ĉiuj ŝtatoj estas simpatiaj, ĉiuj lingvoj tre simpatiaj, sed la religioj indiferentaj; dum kvara montriĝas samdistanca pri la landoj, sed

<sup>16</sup> Ĉi tie eble temas pri eraro en la elekto de la respondo, ĉu oni konsideras sin esperantisto: temas pri homo asertanta, ke li ne konsideras sin tia, sed membras en du asocioj, abonas ses revuojn kaj ofte aktive uzas Esperanton. Tamen sindeklaro kiel neesperantisto forigis lin el la enketitoj validaj por la esploro.

lingvojn kaj religiojn li simpatias. Fine, estas okazoj, kie estas nur pozitivaj sintenoj, sed unuj pli favoraj ol aliaj. Nur unu enketito bloke respondis neniun el tiuj demandoj.

En la fina rezulto la centraj valoroj ĉiam aperas klare plimultaj – krom pri Usono, por kiu la malsimpatio kaj la trea malsimpatio proksimas al la neŭtrala valoro. Pri la ŝtatoj kaj la religioj estas deflankiĝo en la direkto de malsimpatio, dum pri lingvoj al simpatio. Budhismo montras klaran diferencon kompare kun la ceteraj religiaj kredoj, kaj ankaŭ la eŭska ĝuas aparte grandan simpatian.

Sed, kiel dirite, la precipa intereso ne kuŝis tiom en la kontrastigo de la centreco de la mezumaj valoroj, kiom en la egaleco de la prijuĝo de la diversaj elementoj. Tial, ni analizis la variancon de la respondoj de ĉiu individuo, depende de lia opinio pri ŝtatoj, lingvoj kaj religioj: nula varianco montras, ke oni prijuĝis per la sama valoro ĉiujn elementojn de grupo (sendepende de tio, ĉu oni favoris aŭ malfavoris), kaj ju pli grandas la varianco, des pli da devio el sia centra valoro montris la enketito en siaj prijuĝoj. Tiu ĉi mezuro, laŭ ni, pli ĝuste respregulas la forton de la antaŭjuĝoj de la individuoj.

Tamen, entute, malfacilas konkludi, ĉu la varianco altas aŭ malaltas: iom pli ol la duono de la esperantistoj ne atingis 0,5, dum la alia duono situas super tiu valoro. Oni konstatas plej grandan egalecon en la prijuĝoj pri religioj kaj malplej grandan en tiu pri ŝtatoj.

Kvankam tiuj rezultoj ne montriĝas aparte informodona, ili ja fariĝas atentokaptaj, se oni ilin analizas laŭ la malsamaj kategorioj, laŭ kiuj oni dividis la samplon. Aperas ĉi tie granda simileco inter ĉiuj subgrupoj de la diversaj kategorioj. Aparte, oni ne observas signifajn diferencojn depende de la longeco de la esperantisteco. Sekve, ni ne povas konkludi, ĉu la esperantistoj estas pli imunaj al la kliŝoj ol iliaj samlandanoj, sed la datumoj ŝajnas montri, ke Esperanto ne igas, ke ili fariĝu tiaj; eventuale, eble homoj, kiuj estis pli kliŝ-imunaj, fariĝas esperantistoj, sed tion devus pruvi postaj esploroj.

### 5.2.13 Evoluo en la sintenoj

Lige kun la antaŭa aro da demandoj, la afero, ĉu la uzado de Esperanto iel modifas la opiniojn aŭ sintenojn, estas temo malfermita al esploro. Ĉi tie ni specife tuŝis ĝin per du rektaj demandoj: ĉu Esperanto kreskigis la interesiĝon de la enketito pri aliaj landoj, kaj ĉu tio okazis pri lingvoj. La plimulto jese respondis al ambaŭ, kvankam pli multe al la unua. Rimarkindas diferencoj laŭ aĝoj (ĉefe ĉe lingvoj: por 48% de homoj sub 30 jaroj kontraŭ 24% de homoj super 60 jaroj *tre* kreskis ilia interesiĝo pri lingvoj) kaj aparte inter la aktivuloj kaj la ceteraj esperantistoj (por 74% de la aktivuloj kontraŭ 34% de la ne-aktivuloj *tre* kreskis ilia interesiĝo pri landoj).

Sekvaj analizoj devus klarigi, kiagrade tiuj asertoj estas veraj, aŭ ĉu temas pri tradiciaj opinioj de la Esperanto-komunumo. Povus okazi, ke pli engaĝitaj homoj estis pli eksponitaj al iuj grupaj mitoj kaj adoptis ilin, same kiel povus okazi, ke pli granda praktikado de la internacieco de la Esperanto-komunumo kaj la amikiĝo kun homoj el diversaj landoj efektive kreskigis la intereson pri aliaj kulturoj kaj lingvoj. Fine, eblas ankaŭ, ke homoj, por kiuj tiuj interesoj kreskis, konsideris tion pozitiva fakto kaj pruvo pri la pozitivaj konsekvencoj de la lernado de Esperanto, kaj pliigis sian aktivecon. Kaj, kompreneble, la tri fenomenoj povus samtempe okazi.

## 6 Konkludoj

Malgraŭ la forta disfalo dum la frankisma diktaturo (1939-1977), la kataluna esperantismo montras sin homgrupo regule renoviĝanta, kiu prezentas interesajn adapto-traĵojn al tutmondiĝo – de kiu ĝi estas fakte rezulto – kun profunda loka enradikiĝo.

La studo konfirmis la komencajn bazajn hipotezojn, kaj enprofundiĝis en ilin per ilia kvantigo kaj liverante elementojn por klarigi difinitajn fenomenojn. La katalunaj esperantistoj estas tre markite viraj, sufiĉe regule distribuitaj laŭ aĝoj krom sub 20 jaroj, loĝantaj ĉefe en la

grandaj urboj, universitataj studentoj aŭ homoj finintaj superan kleriĝon, ofte instruistoj aŭ komputistoj, ekonomie mezklasaj salajruloj, denaskaj katalunlingvanoj, poliglotoj, ne malofte kun aliland-devena vivkunulo, ateistoj aŭ agnostikuloj, kutimaj legantoj de libroj kaj gazetoj, aktivaj en la politika kaj asocia vivo de la lando – ĉefe en rilato al la kataluna lingvo, homaj rajtoj, helpo al disvolviĝo kaj ekologio – kaj kun forta simpatio al sendependismo, ekologia maldekstro aŭ anarkiismo. Ili konis Esperanton per familianoj aŭ amikoj – tamen lastatempe ofte per Interreto –, sed lernis ĝin pro personaj idealisma konvinko kaj nekonformismo, ĉefe inter la 15-a kaj 30-a jar-aĝo. Multaj iam aktivis en la Esperanto-movado kaj per tio atingas oftan uzadon de la lingvo, ĉefe legan kaj skriban, kaj bonan nivelon. Tamen, kutime ili legas malmultajn librojn en Esperanto kaj, krom la bultenon de la asocio, en kiu ili membras, ne abonas pli ol unu Esperanto-revuon.

Germà Martín, en siaj studoj de la jaroj 2002 kaj 2003 pri la Esperanto-grupo de L'Hospitalet de Llobregat kaj la Esperanto-fako de la asocio Amikoj de Unesko de Barcelono, celis konfirmi la hipotezon, ke “la lernado de Esperanto logas homojn kun preferoj por alternativaj viv-elektoj”, se oni komprenas ĉi tiujn kiel “vivstilon favorantan aron de intereso postmateriismaj (t.e. nemateriaj, ekster la konsumsocio) kaj de vivkompreno el perspektivo de respekto, tolero kaj egaleco de la naciecoj, lingvoj, homoj kaj naturo” (Martín 2004b: 10-11). Lian hipotezon ni plene subtenas ĉi tie.

Aliflanke, la studo montras, ke la persona engaĝiĝo en la Esperanto-movado estas la ĉefa elemento, kiu, en multaj okazoj, permesas atingi fluan parolkapablon – iagrade agante simile al la eksterlandaj staĝoj en la lernado de fremdaj lingvoj. Tamen aktivismo montriĝas tre ligita al familiaj cirkonstancoj, ĉefe al la manko de gefiloj aŭ al ilia emancipiteco. Tiu punkto ŝajnas unu el la elementoj por klarigi la malaltan nivelon de ina partopreno en la kataluna Esperanto-movado – kio estas sentebla en la asocioj, ĝenerale, sed kiu estas multe pli streĉa inter la esperantistoj, kie oni postulas unue la lernadon de lingvo kaj poste la konservadon de ĝia uzkapablo. Estas malkuraĝige trovi tian respugulon de masklisma socio, eĉ inter progresemluloj kun alta studnivelo, la socia grupo de la esperantistoj.

Alia aspekto montrita de la studo estas la granda nombro de internaciaj paroj – fenomeno kreskanta en la socio, sed delonge establita inter la esperantistoj. Tio igis, ke la nombro de lingvoj parolataj en la hejmoj de la esperantistoj estas pli alta ol tiu de la antaŭa generacio, kvankam rimarkinda nombro da esperantistoj devenas de plurlingvaj familioj. Samtempe estas rimarkinda intergeneracia tendenco al pli granda hejma uzo de la kataluna, ĝenerala en la socio.

Aliflanke, estas interese demandi sin, kiel ŝanĝiĝas la esperantistoj, se ili ŝanĝiĝas, pro sia esperantisteco: kiel ilia pli granda interagado kun alilandanoj kaj alilandaj kulturoj evoluigas iliajn sintenojn. Ni starigis la hipotezon, ke la esperantistoj montriĝas pli imunaj al stereotipoj pri ŝtatoj, lingvoj aŭ religioj ol la plimulto de iliaj kuncivitanoj. La hipotezo ne povis esti akceptita aŭ male, sed la datumoj ŝajnas indiki, ke Esperanto ne senteble modifas la antaŭjuĝemon, kiun eventuale havis antaŭe la esperantistoj. Pli specifaj studoj estas farindaj por konfirmi aŭ nuanci tiun konstaton.

Tonkin rimarkigas, ke “esperantistoj similas homojn, kiuj loĝas ekster sia propra lingvokomunumo” (Tonkin 2006: 116). Tio nur parte veras por la katalunaj. Germanaj esperantistoj montriĝis rimarkinde pli kontraŭnaciismaj ol iliaj kuncivitanoj (Stocker 1996: 89). Tiu elemento probable ekzistas ankaŭ ĉe la katalunaj esperantistoj, ĉar i.a. tio estas atendebla ĉe kolektivo, kies trajtoj inkluzivas “komprenon, toleremon kaj zorgon pri ĉies bonfarto”. Tamen tio ne ekskludas fortan ligitecon al la propraj lando kaj lingvo, kiel evidentiĝas en la esploro, kio estas aparte komprenebla ĉe politikizita grupo de neasimiliĝema etna malplimulto.

Entute, ni povas konsideri la katalunan esperantistaron kolektivo rimarkinde “gloka”: samtempe globa kaj loka. Ĉe ĝi montriĝas ebla malfermiĝo al globa (tutaĵa) mondo, de kiu la esperantistoj estas mikrokosmo, konservante fortan ligitecon kun la lando kaj la aŭtoktona lingvo.

## Bibliografio

Alòs i Font, Hèctor (2007): *Perfil sociocultural dels esperantistes de Catalunya*.

[http://www.esperanto.cat/material/esp\\_cat\\_200711.pdf](http://www.esperanto.cat/material/esp_cat_200711.pdf).

Centre d'Estudis d'Opinió (2007): *Valors bàsics, circumstàncies vitals i orientacions polítiques: estudi pilot a la província de Barcelona. Febrer 2007*. Generalitat de Catalunya.

[http://www.gencat.cat/economia/doc/doc\\_21724785\\_1.pdf](http://www.gencat.cat/economia/doc/doc_21724785_1.pdf).

Forster, Peter G. (1982). *The Esperanto movement*. The Hague, Paris, New York: Mouton.

Generalitat de Catalunya (2007): *Enquesta sobre participació política a Catalunya. Gener 2007*. Generalitat de Catalunya.

[http://www10.gencat.cat/gencat/binaris/20070129\\_est\\_participa\\_tcm32-52903.pdf](http://www10.gencat.cat/gencat/binaris/20070129_est_participa_tcm32-52903.pdf).

IDESCAT. <http://www.idescat.cat> [Retejo de Institut d'Estadística de Catalunya].

INE. *Padrón municipal: explotación estadística y Nomenclátor*.

<http://www.ine.es/jaxi/menu.do?type=pcaxis&path=/t20/e245/&file=inebase>  
[Retejo de Instituto Nacional de Estadística, Hispanio].

Martín Muñoz, Germà (2003a): “Grup d’Esperanto de l’Hospitalet. Treball final de Pràctiques de Camp I en Antropologia Social i Cultural” [Universitat Autònoma de Barcelona] [Manuskripto deponita en la biblioteko de Kataluna Esperanto-Asocio].

— (2003b): “Treball de Mètodes d’Investigació en Antropologia Social i Cultural” [Universitat Autònoma de Barcelona] [Manuskripto deponita en la biblioteko de Kataluna Esperanto-Asocio].

— (2004a): “Treball de Tècniques d’Investigació en Antropologia Social i Cultural” [Universitat Autònoma de Barcelona] [Manuskripto deponita en la biblioteko de Kataluna Esperanto-Asocio].

— (2004b): “Treball final de Pràctiques de Camp II en Antropologia Social i Cultural” [Universitat Autònoma de Barcelona] [Manuskripto deponita en la biblioteko de Kataluna Esperanto-Asocio].

Rašić, Nikola (1994): *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio.

Stocker, Frank (1996): *Wer spricht Esperanto? Kiu parolas Esperanton?* München, Newcastle: Lincom Europa.

Tonkin, Humphrey (2006): *Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA.

---

## Hèctor Alòs i Font

Nask. 1965. Komputika inĝeniero kaj licenciulo pri lingvistiko; komputisto; eksa sekretario de Kataluna Esperanto-Asocio. Vivas en Ĉuvaŝio, Rusio.

---